# *Usono malhavas subtenon por ataki Sirion.*




Dum la turniro farata de la ?tata sekretario usona, John Kerry, tra Mezoriento, li klopodas konvinki Turkion subteni aktive la “batalon” kontra? la Islama ?tato fronte al la neglekto de tiu lando, aliancano de Usono kaj membro de NATO partopreni ajnan militan agon.
Turkio, najbaro de Irako kaj Sirio, ne volas aktive partopreni la armitajn operaciojn kontra? tiu grupo, kaj ne subskribis en Yedá (Sauda Arabio) la komunan komunikon de Usono kaj 10 arabaj landoj por batali kontra? la islama ?tato, inkluzive, “se necese, partopreni en milita kampanjo kunordigita”
La turkaj a?toritatuloj timas endan?erigi la vivon de la 46 landanoj kiuj estis sekvestritaj de la Yihad-istoj (jihadistoj)  ekde junio en Mosul, norde de Irako.
La registaro de Ankara anka? ne volas ke Usono uzu la aerbazon de Incirlik (sude), proksima al la siria landlimo, por misioj militaj.

Siaflanke, la ministroj pri eksteraj rilatoj de Britio kaj Germanio esprimis ke ili ne partoprenos la aerajn atakojn planatajn de Va?ingtono sur Sirio por “batali” la islaman ?taton.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/33559-usono-malhavas-subtenon-por-ataki-sirion

**Radio Habana Cuba**